De la parto de EEU, kaj de mi mem, mi sendas plej profundajn kondolencojn al la familio de Josi, kaj al laŭ tuta israela Esperanto-komunumo. Mi ne bone konis Josi, sed foje babilis kun li kaj trovis lin tre simpatia. Dio benu lian noblan animon!

Kundolore kaj malĝoje.

Seán O'Riain (Ireland)

Mi ĵus ekscis ke mia amiko Josi Ŝemer forpasis!
Kia granda bedaŭro!

Mi havis bonŝancon koni lin persone, li gastigis min en lia domo, zorgis pri mi dum mia restado en Israelo. Li ĉiam estis simpatia, afabla, ŝercema, tutkore dediĉita al esperanto kaj esperantista movado. Mi neniam forgesos lin, nian kunan promenadon tra ortodoksa kvartalo en Tel-Aviv en ŝabato, pri lia amikeco. Mi kondolencas, Gefratajn brakumojn ĉefe al lia filo Ŝaŭl Ŝemer, via patro certe restos en mia memoro por ĉiam kaj gefratajn brakumojn por ĉiuj miaj esperantaj geamikoj el Israelo. Granda perdo por nia esperanta movado.

Amike,

Irmina Szustak Varsovio, Pollando



Forpaso de elstara esperantisto ĉiam alportas al ni dolorsenton. Transdiru kondolencojn el ĉina esperantisto al la familianoj de Josi Ĝemer.

Wu Guojiang (Ĉinio)

--- 12年3月30日

From: [Allan Lemos](#)

Date: 03/30/12 23:21:21

To: [Elona Meyronne](#)

Subject: Re: Fw: [ELI-Listo] Memore al Josi

[Elona,](#)

[Permesu min esprimi al vi miajn kondolencojn pro la trista forpaso de Josi.](#)

[Frate,](#)

[Allan](#)

On Fri, Mar 30, 2012 at 16:38, Elona Meyronne <meyronne@netvision.net.il> wrote:

Kara Amri,

kun granda ŝoko mi legis vian mesaĝon pri la morto de Josi. Fine de januaro li skribis al mi antaŭ sia enhospitaliĝo, ja siatempe, kvankam estis riska operacio, li estis sufiĉe optimisma, eĉ ŝercis ankoraŭ, ke, pro la izoleco, li havos apartan ĉambron kaj bonajn manĝojn, kaj ĝuas pli bonajn kondiĉojn ol kutime ĉe UEA ... Do, ni memoru lin kia li estis, ĉiam ŝercema, bonhumora kaj agrabla homo!

Mi nun ne scias, ĉu vi alskribis ankaŭ kelkajn IF-anojn, sed mi faros tion poste, almenaŭ por la partoprenintoj en Nördlingen, al kiuj li (r)estas en elstara memoro pri sia bona prelego pri la hebrea lingvo.

Ĉu vi memoras el pratempo fam. Rawlinson el Anglio? Ili kutime partoprenis kun du etaj infanoj, ŝi estis koreanino kaj oni nomis ŝin Belaluno, nun mi aŭdis de Heleno, ke ankaŭ ŝi mortis antaŭ kelkaj tagoj, pro kancero. La infanoj nun havas 9 resp. 11 jarojn.

Mi longe hezitis, ĉu aĉeti SIM-karton por interretumo en Lanzarote; mi faris kaj nun nur ricevas malĝojigajn informojn ... C'est la vie!

Dumtage, la vetero estas tiom bona (israeleca!) ke ni malkovros la ravecojn de la insulo, kaj ili estas abundaj ĉi-tie!

Same malĝoje kiel vi,

kore salutas, via HDP (Germanio)

Kara Amri,

Mi ege bedaŭras. Mi bone amikiĝis kun li en Jokohamo.

Amike,

Geoffrey Sutton (Britio)

Mi sendas el Brazilo miajn elkorajn kondolencojn pro forpaso de Josi Ŝemer.

Amike,

Eida Lima (Brazilo)

Mi tre bedaŭris kaj nun mi estas malĝoja kun larmoj pro la forpaso de s-ro (Josi) Josef Ŝemer. Tio estis nekredebla sciigo. Ĉar li donis bonegajn zorgadon kaj amikecon al mi dum mia vojaĝo.

Bonvolu akcepti mian plej sinceran kondolencon al liaj parencoj kaj Esperantistoj en Israelo.

--- On Sat, 2012/3/31, ESTHER SEBBAN <esti33333@hotmail.com> wrote:

Kara Ĵunku

Bedaŭrinde estas vere (Josi) Josef Ŝemer forpasis

,Mi estas ege malĝoja estas ne imageble perdo

Jen kion li sendis al mi por klarigi al geamikoj

en Germanio kial li ne partoprerenos IF

amike 

esti aŭ ne

Kara Esti,

Jen tio, kion mi promesis sendi al vi:

Mi havas malsanon ĉee la OSTA MEDOLO (מוח עצם . angle: bone marrow. france:

Moelle osseuse) kaj pro tio la osta medolo ne produktas sufiĉe da sango-globuloj.

Tre tre verŝajne mi devos fari greftadon (השתלה) de osta medolo.

Josi

kaj jen kion ni ricevis de Amri

Karaj geamikoj,

Anatu kelkaj minutoj atingis min (pere de Eldad kaj la fratino de Josi) la ŝoka sciigo.

Tio okazis antaŭ du horoj, post malboniĝo en lia post-operacia situacio en la lastaj tagoj. Mi nun informas nur la proksimajn geamikojn kaj aktivulojn.

Tuj kiam ni scios pliajn detalojn (unuavice pri la entombigo)

mi sendos mesaĝon al ĉiuj membroj kaj internacie.

Funebre,

Amri

Date: Sat, 31 Mar 2012 13:46:55 +0900

From: [verdaoazo](mailto:verdaoazo@yahoo.co.jp)

@yahoo.co.jp

Subject: RetRadio el Pollando

To: esti33333@hotmail.com

Kara Esti

Mi surprizigis ke RetRadio el Pollando elsendis la novajn.

Cu tio estas vere ?

Mi atendos vian respondon.

.Ĵunko

Junko OSIMA

verdaoazo@yahoo.co.jp

Karaj geamikoj

La forpaso de Josi Ŝemer tre tuŝas min kaj estas forta bato por via asocio. Antaŭ unu jaro mi estis lia gasto kaj li parolis pri malsano, sed en esperiga maniero. Mi havas penon kredi, ke tiu batalanto ne plu estas inter ni. Kiel vi skribis, li estis piliero, internacie tre konata kaj ŝatata, ankaŭ pro lia humuro, la judaj spritaĵoj. Mi taksis lin pli aĝa, do li mortis vere tro frue.

Tiu trista novaĵo igas min repensi pri la lastjara kongreso kaj rondvojaĝo kun vi, karaj memoroj revenas spontane. Foje mi demandas min, kiuj anstataŭas la pionirojn.

Mi kondolencas al viaj asocioj kaj funebras kun vi. Kun koraj sentoj kaj salutoj al vi ĉiuj.

Bruno Graf

031 921 44 59

bgraf.o@bluewin.ch

Kara Amri,

Malbonega novaĵo! Ni sciis, ke li estis malsana, sed ni forte esperis, ke li iom post iom resaniĝos.

Bonvolu transdoni al lia familio kaj al la israelaj esperantistoj miajn sincerajn kondolencojn.

Se mi citu inter multajn mian plej bonan memoraĵon pri li: estis vera plezuro ĉeesti lian AIS-kurson en IF pri la hebrea lingvo. Kia agrabla, efika maniero instrui, tiel ke la studentoj ridas dum preskaŭ la tuta kurso! Mi ne devus citi tion, en momento de funebro, sed belas, ke ĝuste tian pozitivan bildon de li mi ĉefe memoros. Kaj venas la grandaj bedaŭxro kaj manko, ke neniam plu ni povos ĝui lian simpatian humuron.

Triste kaj profunde ĉagrenigita,

Claŭde

Hieraŭ estis tiu malfeliĉa tago, kiam ni eksciis pri la forpaso de Josi Ŝemer. Mesaĝon pri tio mi sendis sed ne liste (nur al Amri por plusendo al koncernatoj).

Amike,

Claŭde Nourmont (Francio)

Karaj,

Pro la perdo de la tre estimata Josi Šemer, volu akcepti mian koran kondolencon.
Samideane,
Aparecida Araŭjo
SanPaŭlo/Brazilo

Kara Amri,

Mi estas komencanto en Esperanto. Do mi nun preferas skribi en anglalingvo. I was very saddened to hear about the passing of Josi, who I admire very greatly. I am still trying to get over the shock. I can't get over to Tel Aviv to sit shiva with the others. But please give my condolences to Rivka and the family. I will telephone to the number below.

Amike, Larry Taŭb (Israelo)

Karaj geamikoj,

Ekde la forpaso de Josi ne ĉesis alvenadi kondolencoj el la tuta mondo, kiuj montras kiom amata kaj populara li estis. Mi kunmetis ĉ. cent mesaĝojn ĝis nun alvenitajn – retpoŝte kaj per Facebook - en kreskantan dosieron, kiun ni planas eldoni papere kiel memorlibro. Vi povas ĝin viziti en la retejo de ELI, ĉe <http://www.esperanto.org.il/dosieroj/shemer.pdf> (atingebla ankaŭ rekte de la hejmpaĝo).

Koran dankon al ĉiuj kondolencantoj, nome de la familio kaj de ELI. Via subteno helpas nin en tiu malfacila tempo.

כמאה הודעות תנחומים מכל העולם בדף זיכרון ליוסי שמר באתר האינטרנט של האגודה לאספרנטו בישראל

Amike, Amri

Amri Wandel

Prezidanto de E-Ligo en Israelo (ELI)

amri@huji.ac.il

<http://www.esperanto.org.il/>

Saluton Amri

Mi dankas al vi por vian leteron en la reto.

Speciale por la photo.

Mi gardos ĝin.

Amike,

Judith Epstein (Israelo)

Karaj,

eble vi jam informiĝis, jen la malĝoja informo, ke antaŭ du tagoj mortis nia israela amiko kaj IF-ano Josi Šemer, en aĝo de nur 61 jaroj; la entombigo okazis hieraŭ. Pasintmonate li pasis komplikan operacion el kiu li estis malrapide resaniĝanta. Fine de januaro, tagon antaŭ sia enhospitaliĝo, li ankoraŭ skribis al mi kaj estis sufiĉe optimismisma, ja eĉ iom ŝercis. Antaŭ Xanten li skribis jenon: "Espereble mi estos kuracata dum la proksima jaro kaj tiam povos ĝojege reveni al viaj tre, tre bonaj ĝojdonaj eventoj!".

La sorto havis alian decidon.

Alia malagraba informo, eble kelkaj el vi memoras familion Rawlinson el Anglio, antaŭ jaroj ili plurfoje partoprenis kun etaj infanoj. La edzino, koreanino kun voknomo Belalumo, mortis meze de marto, en aĝo de nur 52 jaroj.

Ni kondolencas.

Kore salutas,

HDP

jarfine al IF 29-a IF en Dortmund

Aliĝstato 44 personoj el 11 landoj
Retpoŝto HDP@internacia-festivalo.de
Interreto www.internacia-festivalo.de

Karaj,

nur ĉi momente mi legas la malgajan mesaĝon pri la forpaso de Josi. Kvankam nur malofte ni rekontiĝis kaj precipe kiam la gepatroj vizitadis Israelon, li tamen estis por mi unu el la ĉefaj vizaĝoj de la E-movado. Li iniciatis tiom multe da aktivecojn kaj projektojn, partoprenis en preskaŭ ĉiuj eventoj kiuj okazis en Israelo kaj eksterlande kaj sciis enmiksigi ĉiujn partoprenantojn por ke oni sin sentu komfortabla.

Ne nur la E-movado perdas senlace aktivulo, sed multaj Esperantistoj perdas amikon.

Mi deziras ĉiujn kaj precipe Ŝaŭl forton dum tiu ĉi malfacila periodo.

Chaja Peer- Bakker (Jerusalemo)

Estimata samideano,

mi apartenas al 240 esperantistoj, kiuj dum tri jaroj ricevadis de Josef Šemer liajn anekdotojn. Mi kolektis ilin kun datoj de dissendo, eble ili estos utilaj por tiuj, kiuj kolektos lian verkaron.

Amike

Miroslav Malovec

Kara s-ano,

Multan dankon por via kontribuo.

En parolo nome de ELI en la entombigo de Josi mi diris i.a.

La ŝercoj pri juda humuro ŝercas kiujn vi sendis ĉiusemajne al centoj da sekvantoj ĉirkaŭ la mondo fariĝis ege popularaj. Antaŭ la operacio vi skribis ke estos paŭzo de du monatoj en la ŝercoj ... kaj nun ŝajnas ke la paŭzo daŭros eterne.

Via kolekto bele memorigos pri Josi, mi proponos aldoni ĝin al la memora retpaĝo.

Danke, Amri

Kara s-ro Amri

Mi tre surprizig^{is} pri la forpaso de s-ro Jozef Ŝemer kaj mi demandis tion al israela amikino Esti. Mi sciis veron kaj mi larmis pro malg^ojo. Fakte mi gastig^{is} c^e lia apartamento en Tel-Avivo. Mi rememoras, ke li gvidis min al la juda muzeo kaj li pasie klarigis la mizeran historion temas pri Judo.

Bonvolu akcepti mian plej sinceran kondolencon al lia filo, parencaro kaj Esperantistoj en Israelo.

Sincere salutas,

J^unko OSHIMA (Japanio)

Estimata samideano,

mi apartenas al 240 esperantistoj, kiuj dum tri jaroj ricevadis de Josef Ŝemer liajn anekdotojn. Mi kolektis ilin kun datoj de dissendo, eble ili estos utilaj por tiuj, kiuj kolektos lian verkaron.

Amike

Mi nun trovis lian invitilon al la anekdotoj. Do mia kolekto ne estas kompleta, ĉar mi estis nur 183-a abonanto.

Mi faris pri li Vikipedian artikolon.
http://eo.wikipedia.org/wiki/Josef_%C5%9Cemer

Miroslav Malovec

Kara Amri,

Fabienne kaj mi estis vere ŝokitaj de la mortinformo pri Josi, kiun mi eksciis de Vi, tra Boris Kolker. Nur kelkajn horojn pli frue ni aŭdis tre bonajn novaĵojn pri la kancero de Fabienne, sed ne eblis longe ĝoji. Nur antaŭ kelkaj semajnoj ni korespondis kun Josi pri lia atendata san-pliboniĝo... Ni vidis la kondolenclibron, kaj ni komprenis ke nia rilato kun Josi estis unu ligilo en tre riĉa amikara reto... Granda familio postploras lian foriron. Necesus diri tiom da aferoj, sed malfacilas.

amike
Fabienne kaj Istvan Ertl

Kara Amri,

Kiam vi informis pri la forpaso de Josi, mi ne havis vortojn pro troa ŝoko.
Poste ankaŭ Tsvi Sadan informis min. Kia realo!
Post la Bjalistoka UK mi kun mia edzo Minoru vizitis la tombejon de Zamenhof en Varsovio. Tiam ankaŭ Josi kun la filo vizitis la tombejon.
Li klarigis al ni, kie estas kies tomboj, ĉar ni sciis nur la tombojn de Ludoviko kaj Klara kaj ne sciis parencajn.
Josi estis ĉiam simpatia en bona humoro al iu ajn.
Mi ploras, ĉar li mankas en la venontjara Azia Kongreso en Israelo.
Elkora kondolencon al lia familio!

TAHIRA Masako el Japanio

Kara Amri,

La informo vere estas ŝokiga...
Mi funebras kune kun Israelaj Esperantistoj la forpason de nia kara amiko kaj sendas miajn sincerajn kondolencojn al liaj hejmanoj kaj proksimuloj.

Karine

Karine Arakeljan
Armena Kultur-Kleriga Centro Espero

33 Khandjian Str., Apt. 4
0010 Erevan, Armenio
Tel.(374 10) 523 426 (h.), 582 478, 582 487, 544 301(of.)
(374 93) 279 906 (p.)

Gekaraj,

Ni tutkore bedaŭhras la forpason de Josi Ŝemer!

Kondolencon al lia familio kaj amikaro

Joachim Böhmeke + Núria Picallo
kaj la tuta E-grupo de Bamberg

Kara ^Saŭli,

Mi sendas al vi nur nun mian kunsenton pro la perdo de via ^satata patro, mia bona amiko Josi (fidela jam ekde 1966!).

La ^soko estis kaj estas tro granda, la nekompreneo pro lia forpaso ne esprimebla.

Mi ne povas imagi ke Josi ne plu estas inter ni, ne plu vivas, kunsentas, korespondas, ^sercas...

Kio okazis dum la lastaj tagoj de lia vivo? Mi forte esperas ke Josi ne tro suferis! Li estis kaj restis tiel optimisma! ^Cu li estis plenkonscia kaj povis akcepti la venantan vivofinon? ^Cu vi havis eblecon adiaŭi lin?

Dank' al Amri mi povis legi la vortojn diritajn ^ce la entombigo kaj ^ciuajn kondolencajn leterojn.

Dank' al Emmi mi nun povas rekte skribi al vi. Mi ja ne kura^gis skribi al vi per la retadreso de via patro (kiel mi ja faris dum Josi restadis en la malsanulejo)...

Restas multaj demandoj. Se vi trovos okazon kaj forton, bonvolu skribu al mi. Ni povos resti en kontakto se vi ^satas tion!

Mi deziras al vi kaj al viaj familianoj (speciale al lia fratino Rivka kaj al lia patro, kiujn mi ambaŭ renkontis en la Tel Aviva kongresejo en 2000) tre multan forton!

Funebre kaj korligita,

Benata (Nederlando)

Kara Amri,

miaj kondolencoj okaze de la forpaso de Josef Šemer.

Li skribis pri la onta operacio.

Ke okazis tiel ...

Dolore,

Grigory Grin

Kara Amri,

mi estiws for de la reto kelkajn tagoj. Vidinte la mesaĝon pri forpaso de Joshi mi ja sentis min tre kortuŝita kaj malgaja. Mi memoris mian lastan renkontiĝon kun li ĉe ILEI-konferenco en Matanzas. Li kiel kutime estis tre sprita.

Bv. transdoni miajn kondolencajn vortojn al la familio kaj al la israela movado. amike

Maritza Gutierrez (Kubo)

Kara Amri,

Hodiaŭ finiĝas "sidi Šiva", ĉu ne? Mi hieraŭ telefone parolis kun Rivka, ankaŭ mi skribis al ŝi retmesaĝon (en la angla).

Nun ni ĉiuj bezonas tempon por kompreni ke Josi vere ne plu estas.

17-a Aprilo estas naskiĝtago de Alexander, mia filo. Kaj "memor-tago" por Josi. Do, Alex kaj mi pensados tutan tagon en Josi.

Mi brakumas vin kore kaj amike

Emmi (Germanio)

Kara Amri,

Geamikoj daŭre sendas al mi mesaĝojn pri Josi, private aŭ pere de diskutlistoj...

Mi plusendos ilin al vi, por enigi ilin en la retan paĝon, kiun vi faris por li.

Jen mi sendas al vi foton faritan en Bjalistoko, kun nia kara Josi. Mi konservas ĝin, kiel memoraĵo de bela travivaĵo (la unua kaj sola UK, kiun mi partoprenis).

Josi estis tiom bonkora kaj ŝercema... Tiu tagon en Bjalistoko, li estis tiom ĝoja...

Bondezirojn por la Paska festo,
Luiza



Konsternego.

Mi estas senvoĉa

Dio kompatu.

Ĝis morgaŭ.

Ĉe tiaj cirkonstancoj, mi ne volas esti teda, sed kelkaj precizigoj estus necesaj por, ke mi estu certa. Ĉu la entombigo jam okazis ? Mi hezitas sendi kondolencojn al la grupo, ĉar senĉese obseda penso revenas: eble li ankoraŭ pluvidas.....

bv pardoni.

Amike

Marcel LEMELTIER (Francio)

Kara Luiza,

kiam Heidi telefonis al mi por doni la malbonan novaĵon pri Josi, mi simple blokiĝis. Kelkfoje ŝi diris "ĉu vi ankoraŭ estas tie?". Mi apenaŭ dormis en tiu nokto. La sekva tago en la oficejo estis eble la plej morna tago kiun mi spertis en tiu loko. Nu, en la CO, konstante ni ricevas tiajn novaĵojn, sed malofte ni ĉiuj estas tiel afliktitaj. La vero estas ke mi konas neniun kiu ne ŝatis Josi. Mi konatiĝis kun li en 1996 kaj de tiam restis ĉiam en tre bonaj rilatoj. En 2001, ni dormis en la sama ĉambro dum la postkongresa ekskurso en Slovenio.

Ripozu li pace!

Korajn salutojn de

Ionel Onet (Nedelando)

Mi tute komprenas vin, tamen bonvolu konsideru ke nia kara amiko Ŝemer el tuta koro deziras, ke ni daŭrigu niajn renkontiĝojn kaj klopodojn favore de E-o, ĉu ne?

Kuraĝige

Luiza Madella

Italio

----- Original Message -----

From: [luiza](#)

To: lakaravelo@googlegroups.com

Sent: Wednesday, April 04, 2012 12:50 PM

Subject: [La Karavelo: 9189]

Karaj geamikoj,

kun granda bedaŭro mi anoncas, ke forpasis nia kara amiko Josef ŜEMER, ja la aĝo de 61, post grava malsano. Li estis tre bonkora kaj amikema homo, kiun multaj el vi konis kaj amis. Por la israela movado li laboris tiom multe, ke ni simple ne kapablas imagi niajn estontajn renkontiĝojn sen li...

Ege malgaje,

Luiza CAROL

Kondolencojn pri lia transvojaĝo.

Dio kaj liaj amikoj lin helpu.

Amike,

João José Santos

Subject: malĝoja novaĵo

Kara samideanino Luiza,

Hodiaŭ dank'al vi, mi konis novaĵon, la tragika morto de Josi. Ekde la pasinta januaro mi sciis nenion pri li, de kiam li enhospitaliĝis. Plurfoje mia penso iris al li, ĉar dum jaroj mi korespondis al Josi, ĉefe pri juda humoro, kelkfoje al li mi sendis ŝercojn kiujn poste li disvastigis; ankaŭ ni parolis pri juda kulturo kaj pri la esperantista movado, pri historiaj aferoj, ktp. KREDU, mi ploras. Nome mia edzino Elisabet kaj mia, bonvolu akcepti nian kondolencon, kaj se vi povas bonvolu informi la israelan samideanaron ke ni ploras la morto de la amiko Josi.

Xavier Margais

Ho ve! Mi memoras lin dum la antaŭxkongreso en Roterdamo. Li estis tre lerta interpretisto! Li ripozu en paco.

Miland Joshi

Kara Amri,

du semajnojn antaŭ la forpaso de karmemora Josi mi sendis al li vican stokon de judaj ŝercoj, kiujn li fervore kolektadis por regule gajigi aron da geamikoj. Ho ve, li jam ne havis eblecon respondi al mi... Do, kiel paskofestan donacon de mi kaj de li mi sendas al vi tiun ŝercostokon. Sendube li estus kontenta, sciante, ke lia hunuremo plu gajigas la homojn.

Mi spektis la testan triminutaĵon kaj deziras al vi bonan sukceson pri hebreigo de la tuta filmo. Ĝi, certe, estos grava kaj utila propagandilo.

Hieraŭ en moskvan presejon iris nova libro, preparita de mi - estas esperantigitaj poemoj de ok juddevenaj poetoj, verkintaj en la rusa lingvo. La Impetanoj promesis, ke la libro estos preta la 27-an de aprilo. Se tio efektiviĝos, mi kunportos ioman stokon en Israelon. La belan kovrilpaĝon oni povas vidi jam nun ĉe www.trovu.com

Brakumas kaj bondeziras,

Mikaelo

Moisej Bronŝtejn.

5 Апрель 2012 г. 19:42:04 пользователь Amri Wandel (amri@huji.ac.il) написал:

Karaj geamikoj,

Okaze de la pasko-festo mi devus tradicie deziri al vi feliĉan paskon, ĝojan printempo-feston ktp. Tamen, ĉi foje pasko alvenas sub la malĝoja ombro de la forpaso de Josi Ŝemer, antaŭ precize unu semajno. Ĝis nun alvenis preskaŭ ducent kondolenc-mesaĝoj de la tuta mondo, rete, en Facebook kaj en Libera Folio. Ili estas kolektitaj en la ĝisdatigita memopaĝo por Josi videbla en la ELI-retejo <http://www.esperanto.org.il/>, kaj fariĝos parto de memorlibro eldonota de ELI.

Denove revenintaj el kanariaj insuloj, mi klopodas digesti la ŝokon pri la morto de Josi. Dum la unua semajno ni ne havis retaliron, sed

poste trovis konvenan SIM-karton en Arrecife (la ĉefurbo) ... kaj tuj ricevis la mesaĝon pri Josi. Mikaelo skribis, ke li ankoraŭ korespondis kun li du semajnojn antaŭe. Supozeble forta bato por la ELI-kongreso, resp. nun pli da laboroj por vi!

Forte antaŭen, amike, HDP

okaze de la Israela kongreso 10 majo 2012

al: Amri, kiu ne estas Mikaelo ...

al: Mikaelo, kiu ne estas Amri ...

Karaj,

dankon pro viaj lastnoktaj mesaĝoj! Momente mi estas en Giessen ĉe miaj ĝemelinoj, jen kaj jen ja la patro devas fari iujn riparojn aŭ novinstalaĵojn en la loĝejo. Nu, morgaŭ ni komune reveturos.

Certe mi iom envias Mikaelon ke li povas ĝui varman Israelon (kvankam hodiaŭ ni ankaŭ atingis modestajn 22 gradojn...), ja pri Ejlat mi ankaŭ havas bonajn memorojn, Amri certe memoras, ke antaŭ pli ol 35 jaroj mi ... estis tie, kune kun Annette kaj iu (!) Gila

La dato pri venontjara Jerusalemo estas ne maltaŭga, eble tiam ankaŭ la ĝemelinoj estos en ferioj, sed mi vidis ke la flugprezoj al Israelo fariĝis sufiĉe altaj, kompare ekz. kun flugo al Ŝarm-el-Ŝejk. Ĝus antaŭ kelkaj tagoj Lidl-vendejo (kiun mi ankaŭ trovis en Lanzarote) ofertis 2 semajnojn al Egiptio, ĉio inkluzive (nu, eble tamen sen ĉarma birdeto), 1 semajnon en hotelo kaj 1 semajnon surŝipe laŭlonge de Nil ... Certe nur en difinita tempo, sed por apenaŭ-imageblaj 499 €.

Mi deziras al via ELI-kongreso bonegan sukceson kaj al ĝia partoprenantaro agrablajn tagojn en verda etoso! Mi povas imagi, ke ĉiu-angule mankas persono, nome nia neforgesebla Josi, sed mi ankaŭ certas, ke bona sukceso kaj multe da rido kaj bonetoso inter ĉiuj partoprenantoj tre plaĉus al li - kaj ke li ripetus la pasintjarajn IF-vortojn ankaŭ pri ELI: "Mi revenis hejmen tre feliĉa, tre bonhumora kaj tre kontenta" !

Ĉion bonan al vi ambaŭ kaj denove dankon pro la mesaĝo!

Amike, via HDP

--

jarfine al IF 29-a IF en Dortmund

Aliĝstato 45 personoj el 11 landoj

Retpoŝto HDP@internacia-festivalo.de

Interreto www.internacia-festivalo.de

8/9/13

Bardhyl Selimi <bselimi@gmail.com>

Hola karaj, hodiaŭ mi ricevis bonorde la revuon Israela Esperantisto, numero somero-vintro. Elkoran dankon!

Mi tuj trafolumis ĝin kaj la unua impresio estis la karmemoro pri Josi.

Ankoraŭ estas viva ĉe mi lia figuro, modesteco, klereco, bonhumoro, malgraŭ ne sukcesa geedzeco.

Li vizitis nian landon en la jaro 2001, poste mi renkontis lin en Florenco 2006 kaj Roterdamo 2008.

Mi dankas vin ke memorigas vian senlakan samideanon, kunlaboranton, unu el la motoroj de via movado enlanda kaj kial ne de la monda e-movado.

Mi interese legis pri aktivecoj en Israelo, la teatraĵeton, la eseon de japano pri israelanoj, la unuan parton de skribaĵo de Andy.

Mi kunsendas kelkajn niajn materialojn, kiujn versŝajne mi ne sendis al vi. Pardonu se tio ĝenus vin.

Amike Bardhyl

Ondo de Esperanto



Marto 30, 3:47

El la ĵurnalo de Aleksander Korĵenkov (Kaliningrado, Ruslando)

Ho, Josi, Josi

Malgajiga novaĵo venis el Israelo. Ankaŭ kelkaj horoj finiĝis la vivo de Josi Ŝemer, tre fama inter esperantistoj, kiu konis lin kiel la prezidanton de ELI, la redaktoron de Israela Esperantisto, la kolektanton kaj populariganton de la juda humuro. Sed ĉefe, ĉiuj sciis, ke Josi estas persono bonega kaj subtenema, neniam malesperanta, ĉiam preta helpi kaj konsili.

Mi konatiĝis kun Josi koresponde antaŭ unu jardeko, kiam li iĝis la unua abonanto de nia gazeto [La Ondo de Esperanto] en Israelo, kaj unuafoje ni renkontiĝis en esperantista mondkongreso somere 2005 en Vilno, ĉi tiu fama "Norda Jerusalemo". Ekde tiam verŝajne ne pasis semajno, dum kiu kiu ni ne interŝanĝis kelkajn retmesaĝojn. Josi pasigis plurajn horojn en bibliotekoj, serĉante (kaj trovante!) en malnovaj judaj eldonaĵoj materialon, kiun mi bezonis; li tradukis ĝin el la hebrea kaj trovis tiujn, kiu tradukis por mi el la juda. Li ĝojegis somere 2009 en Bjalistoko, ekvidinte sian nomon en la listo de personoj, kiujn mi dankis en mia ĵus eldonita libro "Homarano" (kaj li aĉetis dek ekzemplerojn!). Kaj tuj poste li diris, kun iom ruza palpebrumo: "Aleksandro, verŝajne mi ne tute vane vivis mian vivon, ja mi estas dankata en libro, kiun ruso verkis kaj eldonis en Ruslando".

Sed ne! Ni ne ofte konversaciis pri aferoj. Ni plejparte babilis pri ĉio kaj nenio. Eĉ pri tio, kio kutime restas ekster la kadro. Ekzemple, evidentiĝis ke bondeziranto (tiaj entuziasmuloj ne mankas ankaŭ inter la adeptoj de

Esperanto) kalumniis min antaŭ li, kaj Josi konfesis, ke pro tio li komence timis interparoli pri delikataj naciaj temoj kun "la antisemito Korĵenkov", sed poste li malbridis sin... Ankaŭ por mi estis tre interese interkomunikiĝi kun judo, kiu neniam loĝis en Ruslando kaj Sovetunio, kiujn li konis nur onidire, ofte tro naive kredante la Israelan kaj Usonan propagandon.

Mi povus daŭrigi, sed nun mi venas al pli malgaja temo.

Same kiel mia edzino [Halina Gorecka] li atendis grefton. Li tre ĝojis, eksciinte ke ŝia operacio en Moskvo sukcesis, kaj li afektis kuraĝon: ja eĉ se en Ruslando oni facile eltenas greftadon de koro kaj renoj, do tia bagatelo, kia estas medolo, eĉ ne meritas atenton, des pli en Israelo, lando kun elstara medicino, kaj ni baldaŭ rerenkontiĝos en iu kongreso bonetose, interparolos reale, sed ne virtuale. Antaŭ unu monato li estis operaciita.

Komence ĉio estis normala, sed en la lastaj tagoj lia sano draste malboniĝis. Kaj jen - kara amiko Josi, fidela kamarado, neprofitema helpanto, nia abonanto kaj kunlaboranto (dum kelkaj jaroj en nia gazeto aperis lia jud-humura rubriko) forlasis nin. Li ĉiujn forlasis. Ni ne renkontiĝis. Aĥ, Josi, Josi... Kiel malgaje...

<http://sezonoj.livejournal.com/30276.html>

אה, יוסי, יוסי

[מידע] sezonoj

30 במרץ, 03:47

רוסיה, קלינינגרד

חדשות עצובות הגיעו מישראל. לפני כמה ימים נפטר יוסי שמר - אישיות ידועה בקרב האספרנטיסטים, שהכירו אותו כנשיא הליגה הישראלית של אספרנטו, עורך הבטאון Israela Esperantisto, אספן ויוזם פורום ההומור היהודי. והכי חשוב, כולם ידעו כי יוסי הוא איש נפלא, מועיל ומלא חיים, כנה חרוץ, יעיל ומהיר תמיד.

[תרגום מלא יצורף בהמשך]

ועכשיו - ידידי יוסי, חבר אמיתי, עוזר בלתי אנוכי (כמה שנים היה לו טור על הומור היהודי בעיתוננו) עזב אותנו. עזב את כולנו. ואנו לא נפגשנו. אה, יוסי, יוסי ... כמה עצוב ...

Libera Folio

Forpasis Josi Ŝemer

by [Redakcio](#) — Laste modifita: 2012-03-30 10:23

— filed under: [novaĵeto](#)

Forpasis la konata israela esperantisto Josi Ŝemer.



Josi (Josef) Ŝemer estis unu el la pilieroj de la israela Movado dum pli ol kvar jardekoj kaj internacie konata kaj ŝatata esperantisto, li dum multaj jaroj estis redaktoro de la revuo *Israela Esperantisto*. Li estis ankaŭ antaŭa prezidanto de Esperanto-Ligo en Israelo kaj je sia forpaso ĝia sekretario kaj kasisto.

Dum multaj jaroj kaj ĝis nun li senlace gvidis la Tel-Avivan klubon, kiun li vizitadis jam en la aĝo de 17 jaroj. Li estis UEA-delegito en Tel Avivo.

Pasintmonate li trapasis komplikan operacion el kiu li estis malrapide resaniĝanta, sed en la lastaj tagoj lia situacio severe malboniĝis. Li fariĝis 61-jara.

Laŭ informo de Amri Wandel

Bedaŭrinde!

Afiŝita de Russ Williams je 2012-03-30 10:59

Bedaŭrinde! Josef estis ĉiam afablega kaj sprite ŝercema kiam ajn mi bonŝancis renkonti lin. Mi kondolencas.

Bedaŭrinde!

Afiŝita de Rogener Pavinski je 2012-03-30 22:56

Mi same tre bedaŭras kaj kondolencas. Lin mi renkontis unuafoje en KEF 2005 kaj poste nur kelkfoje sed li ĉiam alparolis min kun bona humoro kaj kun simpatio. =(

:-{

Afiŝita de Anna Skudlarska je 2012-03-30 11:21

:-{

Kondolencoj

Afiŝita de Francis Soĝomonian je 2012-03-30 12:29

Mi memoras la bonan humoron kaj la spritan humuron de Josi kiam li ĉiĉeronis dum la plurtaga ekskurso tra Israelo okazinta post la 3a Mediteranea Esperantologia Konferenco.

([http://www.radioradicale.it\[...\]onferenco-de-esperantologio](http://www.radioradicale.it[...]onferenco-de-esperantologio))

Mi esprimas miajn kondolencojn al lia familio, liaj geamikoj kaj al la tuta anaro de ELI.

Granda ŝoko

Afiŝita de Andreas Kuenzli je 2012-03-30 13:40

Granda emocia ŝoko por mi. Dum la pasintaj jaroj mi sporade korespondis kun Josi Ŝemer kaj li ĉiam kontentigis min per siaj akurataj kaj afablaj respondoj kaj komentoj kaj eĉ invitis min veni esti lia gasto en Israelo. Li estis unu el malmultaj e-istoj, kun kiuj mi povis normale kaj objektivite diskuti, kaj kiu ankaŭ ne hezitis sciigi sian personan opinion. Li rakontis pri sia malsano, sed estis optimisma, ke ĉio iĝos bona. Ĉi tian sorton li certe ne meritis. Verŝajne la seriozeco de tiu malsano estis subtaksita de mi kaj aliaj.

Ankoraŭ antaŭenlonge mi sendis al li mesaĝon, sed respondon mi ne plu ricevis.

Josi Ŝemer estis nobla homo, kiu ne estas anstataŭebla, eble la plej lasta grava kaj sincera israela e-isto, kiun mi konis. Verŝajne la israela movado perdis sian plej valoran kaj indan samideanon. Mi esperas, ke UEA adekvate omaĝos al li en la revuo.

kondolencon ...

Afiŝita de reza torabi je 2012-03-31 09:26

Mi bedaŭras lian forpason ...

Tiom bonkora, afabla kaj aktiva persono.

Kondolencon al lia familio kaj amikaro.

granda perdo!

Afiŝita de Elda Doerfler je 2012-03-31 20:24

Konsternite hieraŭ vespere mi eksciis pri la morto de Josi. Kvankam ja antaŭtempe li estis min informinta pri sia tre serioza malbonfarto, tamen lia kuraĝa reago al la malsano kaj lia kutima ŝercemo iel trompis min, tiel ke mi emis kredi, ke fine li sukcesos venki ĝin. Kaj, bedaŭrinde, ne tiel estis. Ne facilas akcepti tian anoncon. Li multe mankos al ni ĉiuj kaj la rememoro pri li nestos por ĉiam en mia koro, kiel same - mi kredas - en tiuj de multaj kaj multaj aliaj esperantistoj.

Kondolencojn tutkorajn al liaj familianoj kaj al ni ĉiuj, kiuj perdis sinceran amikon, valoran kaj

eminentan aganton, kleran esperantiston.
Elda Doerfler

Tristas mi

Afiŝita de José Pinto de Sousa je 2012-03-31 23:15

Tristas mi pro Josi, mia kara samnomulo, kiel mi kelkfoje alparolis lin. Aŭ mia ununura israela amiko, kiel mi diris al mia edzino kiam mi parolis pri li. Kune ni parolis pri cionismo kaj homaranismo: ni malsame opiniis, sed ni respektis unu la alian. Kaj ni parolis ankaŭ pri lingvaj aferoj, pri emeritiĝo kaj pri kion fari poste. En la pasinta decembro li skribis al mi: "Emeritiĝo estas la plej bona afero en nia vivo. Mi ja fruemeritiĝis en junio 2008 (en la aĝo 58) kaj opiniis ke mi estos nur kontenta, sed malbonŝance sufiĉe rapide aperis la malsano." Ankaŭ pri la nomo de sia malsano mi serĉis en Interreto, kaj trovis priajn informojn i.a. en la angla kaj en mia gepatra lingvo: angle MDS - Myelodysplastic syndrome, portugale SMD - Síndrome mielodisplásica. sed mi ne scias kiel oni povus diri en Esperanto. Ankaŭ pri sia malsano li kapablis ŝerci. En antaŭa mesaĝon, li skribis: "eĉ kiam vi skribas al mi vi devas atenti kaj ne tusi aŭ terni dum la skribado..."

Precipe al lia filo, kiun mi konas persone, mi volas esprimi miajn kondolencojn.

Josi, mia neforgesebla amiko

Afiŝita de Emma Breuninger je 2012-04-01 19:15

Josi, amiko dum tiom da jaroj, ekde 1977. Amiko perdita kaj retrovita en la 90-aj jaroj. Josi, la eterna ŝercemulo, kiu sendis judajn ŝercojn al tiom da personoj. Josi, kiu vizitis min dum kristnasko 2008 kaj estis apud mi kiam oni telefone informis min pri la morto de mia patro. Josi, kiu estis kiel frato por mi. Ĉion mi sciis pri tiu aĉa malsano "MDS", sed ne volis imagi ke iu malbona povus okazi. Josi, granda ŝoko - vi ne plu estas inter ni! Ne imagebla neniam plu ricevi mesaĝon vian, ne plu aŭdi vian voĉon, viajn ŝercojn, ne plu aŭskulti viajn konsilojn, ne plu vidi vin dum Esperanto aranĝo. Josi, dankon pro la belaj memoroj kiujn vi lasas al mi. Vi daŭre vivas en mia koro, en mia animo. Josi, neforgesebla amiko! Ŝalom Josi!

Malbonega novaĵo

Afiŝita de trio je 2012-04-01 20:19

Ni estas treege malfeliĉaj ekaŭdi pri Josi. Ni ekrenkontis lin dum la UK en Tel-Avivo. Kiel ĉiuj diris, li estis ŝercemulo kaj inteligenta. Li helpis min malgraŭ mi estis nekonatulo. MDS estas aĉa kaj Josi mortis tro june. Kaj por la movado, ni perdis bonan kunlaboranton.

Reta memorpaĝo de Josi Ŝemer

Afiŝita de Amri Wandel je 2012-04-02 00:25

Ekde la forpaso de Josi ne ĉesis alvenadi kondolencoj el la tuta mondo, kiuj montras kiom amata kaj populara li estis. Mi kunmetis ĉ. cent mesaĝojn ĝis nun alvenitajn – retroŝte kaj per Facebook - en kreskantan dosieron, kiun ni planas eldoni papere kiel memorlibro. Vi povas ĝin viziti en la retejo de ELI, ĉe <http://www.esperanto.org.il/dosieroj/shemer.pdf>

(atingebla ankaŭ rekte de la hejmpaĝo esperanto.org.il).

Koran dankon al ĉiuj kondolencantoj, ankaŭ ĉi tie, nome de la familio kaj de ELI. Via subteno helpas nin en tiu malfacila tempo.

[sekvis linva kritikado kiu ne vere apartenas al tiu-ĉi podio. Reage oni skribis:]

Mortis Josi !!!

Afiŝita de Emma Breuninger je 2012-04-04 22:19

Ni perdis grandan amikon, specialan korplenan homon. Kaj vi batalas por lingvaj eraroj? Bone ke Josi ne plu povas legi tion. Li estus ŝokita. Same kiel mi.

Josi forpasis

Afiŝita de Александр Викторович Корженков je 2012-04-05 11:40

Stranga estas la suba tekstaro... Mi ne emas komenti ĝin, sed mi nur skribas, ke kelkajn horojn post la forpaso de la karmemora Josi mi verkis jenan noton en mia ĵurnalo:

<http://sezonoj.livejournal.com/30276.html>

Эх, Йоси, Йоси



sezonoj

30 марта, 3:47

[Russian Federation, Калининград](#)

Печальная весть пришла из Израиля. Несколько часов назад ушёл из жизни **Йоси Шемер** - известнейшая личность среди эсперантистов, знавших его как президента Лиги израильских эсперантистов, редактора журнала *Israela Esperantisto*, собирателя и популяризатора еврейского юмора. А главное, все знали, что Йоси прекрасный, отзывчивый и неунывающий человек, честный и трудолюбивый, всегда готовый помочь и подсказать.

С Йоси мы познакомились заочно лет десять назад, когда он стал первым подписчиком нашего журнала в Израиле, а встретились впервые летом 2005-го года в Вильне, в этом знаменитом "Северном Иерусалиме", на всемирном конгрессе эсперантистов. С тех пор, наверное, не было недели, когда мы не обменялись бы парой писем. Йоси проводил часы в библиотеках, разыскивая (и находя!) нужные мне для работы материалы в старой еврейской прессе, переводил с иврита и находил тех, кто переводил для меня с идиша. А как он радовался, увидав в Белостоке летом 2009-го своё имя в списке тех, кому я "вырезал благодарность" в только что изданной моей книге (и тут же купил десять экземпляров!). Тогда же Йоси сказал, хитро подмигнув: Александр, коли меня

благодарят в книге, которую русский написал и издал в России, значит я прожил жизнь немножечко не зря.

Но ни боже мой! Разговаривали о делах мы не часто. Больше болтали обо всём. Даже о том, что обычно остаётся за кадром. Выяснилось, например, что доброжелатель (а таких энтузиастов немало и среди приверженцев эсперанто) наплёл ему про меня с три короба, и Йоси признался, что из-за этого поначалу опасался разговаривать на щекотливые национальные темы с "антисемитом Корженковым", ну а потом его "прорвало"... Да и мне было тоже очень интересно общаться с евреем, который ни в России, ни в СССР не бывал, а знал только понаслышке, зачастую наивно веря израильской и американской пропаганде.

Можно продолжать ещё, но, сейчас о грустном.

Как и [моя супруга](#), Йоси ждал пересадку. Как он радовался, узнав, что у неё в Москве всё прошло хорошо, и храбрился, мол, уж если даже в России люди запросто переносят пересадку сердца и почек, то такая чепуха, как костный мозг, да об этом и говорить нечего, тем более в Израиле, где прекрасная медицина, и что мы скоро встретимся на каком-нибудь конгрессе, посидим, поговорим по настоящему, а не в сети. В феврале ему сделали операцию. Поначалу всё шло нормально, но через месяц – резкое ухудшение. И вот - дружище Йоси, верный товарищ, бескорыстный помощник, подписчик и сотрудник (несколько лет у нас в журнале был его уголок еврейского юмора) покинул нас. Всех покинул. Так больше и не встретились. Эх, Йоси, Йоси... Грустно...

Facebook kondolenc-mesaĝoj

el la paĝo de Amri

Karaj geamikoj,

Anatu kelkaj horoj forpasis Josi Ŝemer, 61 jaraĝa. Unu el la pilieroj de la israela Movado dum pli ol kvar jardekoj kaj internacie konata kaj ŝatata esperantisto, li estis longjara redaktoro de la revuo "Israela Esperantisto", antaŭa prezidanto de ELI kaj nun ĝia sekretario kaj kasisto. Dum multaj jaroj kaj ĝis nun li senlace gvidis la Tel-Avivan klubon kaj estis UEA-delegito en Tel Avivo. Estu lia memoro benata.



Like · · [Share](#) · [Yesterday at 2:53am](#)

-
- [Diamante Jakubene](#), [Oded Gilad](#), [Bilha Tilleman](#) and [7 others](#) like this.
- [1 share](#)

•



○

[Katalin Kovats](#) neeee, ne eblas..... mi estas tute ŝokita. La 5an de marto, ĵus revennte el la hospitalo li skribis al mi tute optimisme kaj esperplene... mi simple ne volas kredi ke tamen ne sukcesis la graftado.....

[Yesterday at 3:01am](#) · Like



○

[Katalin Kovats](#) kompreneble greftado...sed tio tute ne gravas..


[Yesterday at 3:03am](#) · Like



○

[Kostas Kiriakos](#) Sincerajn kondolencojn al la israela esperantistaro kaj lia familio!

[23 hours ago](#) · Like



○

[Arjen-Sjoerd de Vries](#) Mi ĉiam memoros kiel gastame li akceptis min kiam mi unuafoje vizitis Israelon, kiom li faris por sukcesigi mian vojaĝon. Ni perdis plej varman kaj bonkoran amikon.

[21 hours ago](#) · Like



○

[Marianne Maürer](#) Mi ne povas imagi. Mi estas tre ŝokita. Tiom bonkora amiko, ĉiam ridetante, ĉiam bonhumora. Restu en paco, kara Josi.

[18 hours ago](#) · Like · [2](#)



○

[Bilha Tilleman](#) Nia kondolencoin al la familo.(:


[17 hours ago](#) · Like



○

[Vitor Luiz R Anjos](#) kia bedaŭro ! :-(

[16 hours ago](#) · Like



○

[Loes Demmendaal](#) Elkore kondolencas al familio kaj amikaro

[16 hours ago](#) · Like



○

[Amri Wandel](#) Dankon al ĉiu kondolencantoj.

[15 hours ago](#) · Like



○

[Amri Wandel](#) El la tuta mondo fluadas kondolencmesaĝoj, kiujn ni publikigos en speciala memopaĝo en la retejo de ELI – eblas skribi al eli@esperanto.org.il aŭ en la Facebook paĝo <http://www.facebook.com/eldad.salzman> aŭ ĉi tie .

Hieraŭ, kelkajn minutojn antaŭ ol mi ricevis la sciigon pri la forpaso , mi informis vin ke la venonta klubkunveno okazos post la pasko, la 17an de aprilo. Nature tiu vespero estos dediĉita al la memoro de Josi , ĉiu bonvenas dividi personajn memorojn.

רבים מאיתנו נפגשו היום בהלוויה של יוסי. יושבים שבעה בימים א-ד אצל אחותו, רבקה מרגלית, רח' קק"ל 16 רחובות, טלפונים 08-9461107, 054-479 3633. להודעות השתתפות (שיפורסמו באתר האגודה לאספרנטו)

eli@esperanto.org.il

<http://www.facebook.com/eldad.salzman> ובדפי הפייסבוק של אלדד

וכאן

מפגש המועדון בתל אביב ב-17.4 (מיד אחרי חפשת הפסח) יוקדש לזכרו של יוסי, כולם מוזמנים לחלוק זכרונות אישיים.

[15 hours ago](#) · Like



○

[Irmina Szustak](#) granda bedaŭro... ;(



●


[Ite Tytgat](#) ANkaŭ ni tre bedaŭras. Niajn kondolencojn al la familio kaj esperanto klubo.

[4 hours ago](#) · Like




• [Teresa Uzowska](#) Kondolencoj por tutan familion.

[4 hours ago](#) · Like




• [Irit Paz](#) כמה נורא להיתקל במידע כזה בפייסבוק. יוסי היקר. יהי זכרו ברוך.



• • [Amri Wandel](#) אכן, וגם לנו זה בא בהפתעה. היתה השתלת מח עצם אבל היא כבר הצליחה, יוסי היה אופטימי וציפינו להתאוששות, גם אם איטית, כצפוי - אבל בימים האחרונים חלה הדרדרות וגופו שהיה ללא מערכת חיסונית לא עמד לו.

[Saturday at 7:27pm](#) · Like · 1




• [Bilha Tillemann](#) עירית פז במקרה זה, עד כמה שזה נורא, זו הייתה האפשרות המהירה להעביר את ההודעה הקשה להרבה מאוד אנשים ...

[Saturday at 7:44pm](#) · Like



• [Bilha Tillemann](#) עדיין קשה לעכל...

[Saturday at 7:44pm](#) · Like




• [Bilha Tillemann](#) Dankon Amri pro viaj vortoj en la tombejo

[Saturday at 7:51pm](#) · Like



• [Antonio Perera Ortega](#) Bedaŭrinda novaĵo, sicerajn kondolencojn al via familio.

[Saturday at 8:03pm](#) · Like



• [Tuomo Grundström](#) Bona memoro rfestas post bona homo.

[Saturday at 9:54pm](#) · Like



• [Emma Breuning](#) Amri, ni du konatiĝis danke al Josi, ĉu vi memoras? Ne imageble ke mi ne plu vidos lin dum iu Esperanto renkontiĝo. Li ĉiam estos en mia koro.

[Yesterday at 6:03pm](#) · Like



• [Jinsu So](#) Sinceran Kondolencon al lia familio! Mi rememoras la unuan renkontiĝon kun li okaze de la IJK en 1986, kaj ankoraŭh memoras lian helan ridon. Feliĉon en la ĉielo !

[9 hours ago](#) · Like



• [Amri Wandel](#) Dankon karaj. Ĉiuj kontribuoj, retpoŝtaj, en Facebook kaj en Libera Folio nun troviĝas nun en memopaĝo por Josi, <http://www.esperanto.org.il/>

[Esperanto-Ligo en Israelo](#)

www.esperanto.org.il

Esperanto-Ligo en Israelo

[4 hours ago](#) · Like ·



• [Narendra Raj Bhattarai](#) mi havis honoron renkonti lin.kiu sciis li forlasos tiom frue.restu lia animo pace.

[2 hours ago](#) · Like



• [Manandhar Razen](#) Sinceraj kondolencoj al samideanoj de Israelo. Estu lia memoro via energio por pli labori por la enlanda kaj internacia movado de Esperanto.

Facebook kondolenc-mesaĝoj

el la paĝo de Eldad

- שלום חברים, לצערי, לא איש בשורה אני היום. לפני זמן קצר איבדנו את אחד האנשים היקרים ביותר, את יוסי שמר. הוא נפטר ממחלה, לאחר הידרדרות פתאומית שחלה במצבו במהלך הלילה.

Saluton, karaj amikoj,

Mi ege bedaŭras informi vin, ke ni perdis nian karan amikon, Josi Ŝemer, kiu forpasis hodiaŭ, antaŭ nelonge, post kelkjara malsano. Ĉi-nokte lia sanstato rapide malboniĝis en la malsanulejo, kaj lia familio sidis apud lia lito dum la lastaj horoj.

Dear friends, I'm sorry to be a bearer of bad news: our dear friend Josi Ŝemer passed away a while ago at the hospital, after a sudden deterioration in his illness that occurred during the night .

יהי זכרו ברוך!

!Estu lia memoro por eterne benata
.May he rest in peace.

Like · · [Thursday at 10:28pm](#) ·

-
- [Eran Vodevoz](#) and [Oded Gilad](#) like this.
-



o

[Dan Meyer](#) -(

[Thursday at 10:31pm](#) · Like · [2](#)



o

[Bilha Tilleman](#) יוסי יקירנו, לא נשכח אותך לעולם! תהא נשמתך צרורה בצרור החיים!

[Thursday at 10:34pm](#) · Like · [2](#)



o

[Leif Nordenstorm](#) Mi tre bedaŭras.

[Thursday at 10:37pm](#) · Like · [2](#)



o

[Eldad Salzman](#) Jes, ni neniam forgesos Josi. Mi neniam forgesos lin. Li estis mia kara amiko dum multaj jaroj, ĉiam helpis pri ĉio, ĉiam estis la gaja spirito pri ĉiuj niaj aranĝoj. Granda perdo.

[Thursday at 10:37pm](#) · Like · [2](#)



o

[Arjen-Sjoerd de Vries](#) Kondolencon al ĉiuj liaj amikoj kaj parencoj. Kiom li mankos al ni.

[Thursday at 10:38pm](#) · Like · [2](#)



o

[Eldad Salzman](#) Aĥ, tute neimageble, esti sen li....

[Thursday at 10:39pm](#) · Like · [1](#)



o

[Rogério Portella](#) Mi bedaŭras legi tion kaj sincere prezentas mian kondolencon.

[Thursday at 10:39pm](#) · Like · [2](#)



o

[Bilha Tilleman](#) Bedaŭrinde באספרנטו המילה ? את המילה בשגיאה ?):

[Thursday at 10:40pm](#) · Like · [1](#)



o

[Eldad Salzman](#) בלהה, המילה נכונה.

[Thursday at 10:40pm](#) · Like · [1](#)



○

[Bilha Tilleman](#) ליבי נשבר!! תנחומים לבני המשפחה ולמשפחת אספרנטו בישראל.

[Thursday at 10:43pm](#) · Like · [1](#)



○

[Ofra Shay](#) משתתפת בצערך אלדד

[Thursday at 10:50pm](#) · Like · [2](#)



○

[Eldad Salzman](#) תודה רבה, עפרה.

[Thursday at 10:51pm](#) · Like



○

[Bilha Tilleman](#) מודה לך אלדד!

[Thursday at 10:53pm](#) · Like · [1](#)



○

[Maria Mickle](#) eternan Pacon por via Amiko !

[Thursday at 10:55pm](#) · Like · [1](#)



○

[Bilha Tilleman](#) אבד לנו חבר בלב ונפש כבן משפחה וכזה יישאר בלבנו! :

[Thursday at 10:56pm](#) · Like · [1](#)



○

[Anna Lowenstein](#) Mi ege bedaŭras. Tio estas tre malbona novaĵo.

[Thursday at 11:00pm](#) · Like · [2](#)



○

[Anna Lowenstein](#) Li ĉiam havis tiel gajan humoron, ke estas malfacile imagi, ke io tia povus okazi al li.

[Thursday at 11:03pm](#) · Like · [2](#)



○

[Can Zamur](#) Mi kondolencas mi konatiĝis kun li, kiam mi estis en Israelo bona homo ,

[Thursday at 11:19pm](#) · Like · [2](#)



○

[Nadav Slotky](#) Kondolencon. Mi ne konis lin, sed mi ankoraŭ bedaŭxras aŭdi...

[Thursday at 11:21pm](#) · Like · [2](#)



○

[Eldad Salzman](#) Thank you very much, dear friends, for all your warm words. Indeed, I still cannot imagine that he is no longer with us. He was part of us for so many years, he was my teacher of Esperanto many years ago, my mentor, my friend, a brother.

[Thursday at 11:22pm](#) · Like · [3](#)



○

[Bilha Tilleman](#) My heart is with all the Esperanto friends and with you Eldad ,he was the sme for usl


[Thursday at 11:26pm](#) · Like · [1](#)



o

[Eldad Salzman](#) Josi estis mia instruisto de Esperanto antaŭ multe da jaroj. Li estis kara amiko mia, kvazaŭ frato. Ĉiam gvidis nian movadon, ĉiam estis la gaja spirito en ĉiuj niaj aranĝoj. Estas vere neimageble pensi pri tio, ke li subite ne plu estas kun ni. Dum la lastaj jaroj oni malkovris ĉe li sangmalsanon, kaj li devis trapasi greftadon. Bedaŭrinde, dum la lastaj tagoj la situacio de lia korpo rapide malboniĝis pro malfacilaĵoj post la greftado, kaj hodiaŭ li, tute neatendite de ni, forpasis. Estu lia memoro por ĉiam benata kaj kara al ni.

[Thursday at 11:26pm](#) · Like · [3](#)



o

[Arjen-Sjoerd de Vries](#) Mi ĵus relegis liajn retmesaĝojn... Kiom da optimismo pri la operacio, estas nun dolorige relegi tion. Kaj nekredeble kiom da humuraĵoj li kolektis kaj dissendis. La vivo estos malpli gaja sen Josi.

[Thursday at 11:30pm](#) · Like · [4](#)



o

[Nicole Else](#) Mi pensas ke mi konatiĝis kun li en 1979. Ni estis en la sama trajno veturante de la IJK al la UK en Lucerno. Li donacis al mi bildkarton kiun mi bedaŭrinde ne sukcesas nun trovi. En mia taglibro de 1979 mi skribis, ke en la trajno mi babilis kun israelano kiu multe ŝercis, diris in-formojn, ĉevalo ĉe valo, ktp.

[Thursday at 11:52pm](#) · Like · [2](#)



o

[Edvige Tantin](#) Ho ne!!!! Kian teruran perdon por la familio, por la geamikoj, por la movado, por ni ĉiuj!!! leginte la unuajn vortojn de Eldad, mi preskaŭ ne volis kredi al miaj okuloj..... Mi forte ĉirkaŭbrakas Saŭl-n, miajn kondolencojn.

[Yesterday at 12:04am](#) · Like · [2](#)



○

[Eran Vodevoz](#) Neimageble!!

[Yesterday at 12:14am](#) · Like · [1](#)



○

[Eldad Salzman](#) הלוויה תיערך מחר, בבית העלמין האזרחי בקריית שאול, בשעה 11 בבוקר.

[Yesterday at 12:25am](#) · Like



○

[Shirley Amrani](#) אני כל כך עצובה. נותנת לדמעות לדבר במקומי.

[Yesterday at 12:59am](#) · Like · [1](#)



○

[Wasseem Zaher](#) !!!!!

[Yesterday at 1:28am](#) · Like · [1](#)



○

[Eldad Salzman](#) אין, אין מילים... אין מה לומר, פשוט, קשה לדמיין שהוא כבר לא איתנו... כל כך צעיר.


[Yesterday at 1:31am](#) · Like



○

[Judith Epstein](#) Mi tre bedaŭris aŭdi pri la morto de nia kara amiko Josi Ŝemer. Li estis mia amiko dum multa da jaroj. Estu lia memoro benita.

[Yesterday at 1:33am](#) · Like · [1](#)



○

[Judith Epstein](#) יהי זכרו של יוסי ברוך. זו אבדה גדולה לחבריו ולאגודת האספרנטו כולה.

[Yesterday at 1:34am](#) · Like · [1](#)



○

[Ziko van Dijk](#) Ankoraŭx lastjare en somero mi restis kelkajn tagojn ĉe Joŝi en lia apartamento en Tel-Avivo. Mian elkoran kondolencon.


[Yesterday at 2:32am](#) · Like · [1](#)



○

[Anat Zajdman](#) Mankas vortoj

[Yesterday at 6:10am](#) · Like · [1](#)



○

[Nepala Esperanto Asocio](#) estas grandega perdo por esperantomovado


[21 hours ago](#) · Like · [1](#)



○

[Eli Bar-Yahalom](#) Ekde 1982 mi konis lin. Nepriskribebla. Li estis tiel juna kaj vigla, ke ŝajnis, ke li estos eterna.

[20 hours ago](#) · Like · [1](#)



○

[Rashid Awad](#) Akceptu miajn kondolencojn. Ĉiam estas malgaje perdi amikon, eĉ kiam tiu multe suferis. Oni memoru la sunajn tagojn . . .

[20 hours ago](#) · Like · [1](#)



○

[Marianne Maŭrer](#) Tre, tre malgaja novaĵo. Mi ne povas imagi. Mi estas tre ŝokita. Tiom bonkora amiko, ĉiam ridetante, ĉiam bonhumora. Restu en paco, kara Josi.

[18 hours ago](#) · Like · [1](#)



○

[Didier Izacard](#) Mi estas ege malĝoja legante tiun malbonan novaĵon.! Jes malfacile imagi Esperanto-vivon kaj mondon sen li, kiu estis ĉiam kara, gaja kaj bonkora. Miaj kondolencoj!

[17 hours ago](#) · Like · [1](#)



○

[Ziko van Dijk](#) Mi renkontis lin unuafoje en Prago, UK 1996.

[16 hours ago](#) · Like · [1](#)



○

[Amri Wandel](#) Multaj el vi ĉeestis en la entombigo hodiaŭ. Krom la propra familio kunvenis ankaŭ la verda. Oni "sidas Ŝiva" en la hejmo de la fratino, Rivka Margalit, Str. Kakal 16, Rehovot.

Hieraŭ, kelkajn minutojn antaŭ ol mi ricevis la sciigon pri la forpaso, mi informis vin ke la venonta klubkunveno okazos post la pasko, la 17an de aprilo. Nature tiu vespero estos dediĉita al la memoro de Josi.

שלום חברים,

רבים מאיתנו נפגשו היום בהלוויה של יוסי. יושבים שבעה בימים א-ד אצל אחותו, רבקה מרגלית, רח' קק"ל 16 רחובות

שלי <http://www.facebook.com/profile.php?id=1530849334>

מפגש המועדון בתל אביב ב-17.4 (מיד אחרי חפשת הפסח) יוקדש לזכרו של יוסי, כולם מוזמנים לחלוק זכרונות אישיים.



Amri Wandel

[16 hours ago](#) · Like · [1](#) ·



o

[Lusi Rimon](#) Kia bedaŭra forpaso. Ege malĝoja informo. Josi estis vera animo de israela klubo kaj tre bonkora homo. Kondolencojn..

[13 hours ago](#) · Like · [1](#)

- [Lusi Rimon](#) Kia bedaŭra forpaso. Ege malĝoja informo. Josi estis vera animo de israela klubo kaj tre bonkora homo. Kondolencojn..

[21 hours ago](#) · Like · [1](#)



•

[Jan Navrátil](#) Kun tristo mi rememoras...

[4 hours ago](#) · Like · [1](#)



•

[Dani Gancurin](#) Josef Ŝemer - motoro de la Israela Esperanto-movado

אלה איש אספרנטו בארץ, בעיני סגן של זמנהוף, כל אהבתי לאספרנטו MOTORO והוא היה לא סטם רק בעזרתו, ללא ספק,

LA KLUBO MORTAS-NE SENDUBE NE אני זוכר במפגש אחרון-יוסי אמר כאשר אה מעט משתתפים-

ESPERANTO KLUBO DE JOSI ŜEMER אני פונה לעמרי-אנא לשקול לתת שם למקום שלנו בתל-אביב-

[3 hours ago](#) · Like



• [Amri Wandel](#) לקרוא למועדון התל אביבי על שם יוסי –

Esperanto klubo "Josi Šemer "

לדעתי רעיון יפה וראוי, כיון שיוסי היה המארגן והרוח החיה של המועדון. אציע זאת להנהלה.

- [Eldad Salzman](#) כן, זה בהחלט רעיון יפה. שוב ושוב אני מתקשה לחשוב על כך שיוסי כבר לא אתנו, ושאכן אפשר לקרוא למועדון על שמו, כי זה כאילו שאנחנו קוראים למועדון על שם מישהו חי... האובדן היה מהיר מדי, פתאומי מדי...

[about an hour ago](#) · Like



• [Eldad Salzman](#) תודה רבה, דני, על הצעתך היפה!

La judaj anekdotoj de Josi

La ŝercoj pri juda humuro kiujn Josi sendadis ĉiusemajne al pli ol ducent sekvantoj ĉirkaŭ la mondo fariĝis ege popularaj. Antaŭ la operacio Josi skribis ke estos paŭzo de du monatoj en la ŝercoj ... bedaŭrinde tiu paŭzo neniam finiĝis... Du tagojn post la forpaso atingis min tiu mesaĝo de unu el la "abonantoj".

From: Miroslav Malovec [mailto:malovec@volny.cz]

Sent: Sunday, April 01, 2012 11:52 PM

To: amri@huji.ac.il

Subject: Josef Ŝemer kaj liaj anekdotoj

Estimata samideano,
mi apartenas al 240 esperantistoj, kiuj dum tri jaroj ricevadis de Josef Ŝemer liajn anekdotojn. Mi kolektis ilin kun datoj de dissendo, eble ili estos utilaj por tiuj, kiuj kolektos lian verkaron.

Amike

Miroslav Malovec